

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 1/1999
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Februaro 1999

Look inside for:

Vortoj de la Prezidanto	2
Vortoj de la Majstro	3
Reviziado de PIV	4
Alia Ellen Eddy?!	5
Alia NAKE-into parolas	6
Update on your Passport	8
From the CO	9
Koresponddeziroj	9
Recenzoj: novaj muzikaĵoj	10
Loke kaj regione	11
Esperanto in the media	11
Menciinde	11

Saint Louis, Missouri
invitas vin (p. 6)

Estrara decido 1999-1: Dankon al Catherine Schulze

La Estraro de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko rekonas la elstarajn kontribuojn de Honora Membro Catherine L. Schulze al nia landa Movado. Specife ni rekonas la grandegan laboron de ŝi kaj Honora Membro William H. Schulze pri ne unu sed du el la plej gravaj kaj longdaŭraj klopodoj por Esperanto:

- ★ *la plej grava kontribuo al Esperantaj edukado kaj kulturo en nia lando, la mondfama SFŜU-kursaro. Tiom el ni ĉeestis, lernis, amikiĝis, eĉ aktivigis pro la kurso, ĝiaj instruistoj kaj ĝia administrantino; kaj*
- ★ *la plej grava klopodo Esperantigi personojn en nia lando, la fama Senpaga Dek-leciono perpoŝta kurso, per kiu tiom el ni komencis niajn vojaĝojn en Esperantujojn. La postenoj kaj aliaj laboroj de Cathy kaj Vilĉjo, ekde 1946 ĝis la nuno, eĉ koncize pleningas tutan paĝon. Specife je la okazo de la transdono de la supraj du kolonoj de nia Movado al Ellen Eddy, la Estraro de ELNA unuanime voĉdonas al nia kara Cathy:*
- ★ *nian ĉiaman rekonon de ŝiaj laboroj kaj atingoj; kaj*
- ★ *nian tutkoran estimon; kaj*
- ★ *niajn plej profundajn dankojn.*

La Estraro de ELNA



Cathy okaze de sia 85-jariĝo

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,
USA/USONO
tel: 510/653-0998; fax: 510/653-1468;
e-mail: elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: David T Wolff
Vice President/Vicprezidanto: Derek S Roff
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: Anna Bennett
Other Board Members/Alia estraranoj:
Steven G Belant, Mike Donohoo, Grant T Goodall, D Gary Grady, Michele Gregory, Dorothy B Holland, Reginald Jaderstrom, Orlando E Raola, Sylvan J Zaft

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Miko Sloper
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo: Ionel Oneț

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 35, No. 1

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Ionel Oneț
tel. 510/653-0996; fax: 510/653-1468;
e-mail: ionel@esperanto-usa.org

Materials for *esperanto USA* should be sent to/Materialojn por *esperanto USA* oni sendu al: *esperanto USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA/USONO, or by e-mail/aŭ e-poŝte al: elna@esperanto-usa.org.

The opinions expressed in this newsletter are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its newsletter/La opinioj esprimataj en ĉi novaĵletero apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties novaĵletero.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 26.03.1999.

Saluton ĉiuj,

This month I want to recognize and thank several people for special contributions to Esperanto.

For many years, Cathy Schulze has organized two of the most important efforts for Esperanto in North America. The first is the San Francisco State University summer courses, recognized worldwide as an outstanding course for both new and advanced Esperantists. The second is the free ten-lesson course that has helped so many Esperantists get started. Cathy has recently handed both of these responsibilities over to Ellen Eddy, who, I am sure, will do an excellent job. The ELNA Board approved a heartfelt resolution recognizing and thanking Cathy for her long and important contributions. (see front page – ed.)

This month, I am particularly pleased to send an Ege Bone! to Ben Stevens in Pennsylvania. We have long needed a handbook for local groups, to help new groups learn what to do and to help existing groups be more effective. Several people have volunteered to do this since 1993. After all these years, one has finally succeeded. The Central Office sent Ben's first draft to all our local groups and grouplets*, and we invite feedback and additions to the handbook. Contact the CO if you'd like a copy.

I am sending an Ege Bone! to David Pardue in Kansas. David collected 45 translations of the phrase "One beer, please" from Esperantists around the world. We are using those to create a poster that non-Esperantists will actually want to have. David was particularly effective in requesting the translations, collecting them for easy assembly, and getting them to me. In addition, Stanley Neil Glass (who is also working hard on this year's National Convention in St. Louis) gets an Ege Bone! for scanning the Chinese, Korean, and Japanese translations that are included in the poster. And Gary

Grady gets an Ege Bone! for assisting with the text of the poster and for bringing the idea to me (though he disclaims responsibility for either). David, Stanley, and Gary worked quickly and effectively. Still, as always, these things take longer than expected. The Beer Poster is held up while I get one entry double-checked, but perhaps we'll have it ready by the time this reaches your hands. We'll have both a short version (one page, 26 languages) and a long version (45 languages so far). Both will be available on paper through ELNA and the long version will be on our web site.

A clarification on one item in the previous issue of *EsperantoUSA*. The "Esperanto in the Media" section mentioned Grant Goodall's ad about Esperanto in *Trips* magazine. This was not just a haphazard event. The ad is one of the first results of the Publicity Committee's work, and Grant did a great job of negotiating with *Trips* to get a larger ad at a much lower price than their usual fee. They may also print an article about Esperanto in a later issue. The committee is also running small (and cheap) classified ads in the *Mensa Bulletin*** , which reaches about 50,000 readers monthly, and we will be doing some direct-mail advertising to teachers in the next month or two.

Thanks --

David WOLFF, President
dwolff@world.std.com
978/264-0286 (8-10pm Eastern time
weekdays, noon-5pm weekends)

- * This would be fine Esperanto. Why doesn't it work in English?
** Thanks to the efforts of President Wolff. (ed.)

PRI PLENA VORTAREGO

Efektive, ni ekstreme bezonas plenan vortaregon, kiu enhavus ne sole ĉiujn vortojn de la ordinara vivo, sed ankaŭ ĉiujn vortojn teknikajn de ĉiuj sciencoj, artoj kaj metioj, ĉiujn nomojn geografiajn, historiajn, personajn k.t.p.; nia Lingva Komitato farus al ni tre grandan servon, se ĝi per komuna laboro de ĉiuj siaj membroj pretigus tian vortaregon. Sed eldoni tian vortaregon kun karaktero *oficiale fiksita* la Lingva Komitato nun *ne* povas kaj longe ankoraŭ ne povos, ĉar tia laboro estas ne sole tre malfacila kaj la kompetenta esploro kaj fikso de ĉiuj el la senlima multego da vortoj postulas multege da tempo kaj fortoj, sed tia laboro estus eĉ rekte malutila. Se tian grandamplaksan fiksitajn vortaregon, kiun povas krei nur tre longa kaj ĉiuflanka uzado kaj elprovado, ni volus pretigi teorie kaj «en rapideco», ni tre danĝere enkatenugis nian lingvon, ni malpermesus al ĝi libere kaj sane disvolviĝi; ni perforte altrudus al la lingvo multajn formojn kaj vortojn, kiuj al tiu aŭ alia kunlaboranto de la vortaro pro nesufiĉa elprovo en la unua momento ŝajnis bonaj, sed kiuj poste en la praktika uzado povus montriĝi tute malbonaj. Tia konsidero estis interalie ankaŭ la kaŭzo, pro kiu mi, publikigante mian unuan libron pri Esperanto, decidis forĵeti la tro grandan vortaron kaj tro abundan afiksaron, kiujn mi estis pretiginta teorie, kaj mi decidis publikigi vortareton nur tre malgrandan kaj nur plej necesan por la ordinara vivo, lasante ĉion alian al libera, iom-post-ioma ellaboriĝado. Sed se la Lingva Komitato ne povas doni al ni jam nun plenan vortaregon *oficiale fiksitajn*, ĝi povas tamen fari ion alian (kaj parton de tio ĝi jam faris kaj faras): dividinte la grandegan laboron inter ĉiuj komitatanoj (el kiuj ĉiu nepre devas ion fari) kaj inter la helpantoj, ĝi povas krei en ne tro longa tempo plenan vortaregon *provizoran*. Kiam tiu vortarego estos preta, ĝi servos kiel neoficiala kaj ne deviga konsilanto por ĉiuj, kiuj bezonas uzi tiun aŭ alian vortaron aŭ nomon, sed ne povas aŭ ne volas mem ĝin elekti kaj ne havas la eblon serĉi en nia tuta literaturo, ĉu kaj kiamaniere iu jam uzis tiun vorton. Tiu «rapidece» pretigita vortarego tute ne estus deviga: ĉiu, kiu trovas, ke tiu aŭ alia vorto estas malbona, havas plenan rajton uzi alian vorton; kaj poste la Lingva Komitato povus periode publikigadi listojn da vortoj, pri kiuj ĝi estos konstatinta, ke la vivo kaj kompetentula uzado fiksas por ili alian formon, ol kiun ili ĝis nun havis en la provizora vortarego; sed ĉiuj vortoj, kiuj oficiale ne estos anstataŭigitaj, restos uzeblaj. Tiamaniere la Provizora Vortarego kun ĝiaj estontaj periodaj Aldonoj restos ĉiam plej grava konsilanto por ĉiuj verkantoj, kaj el la vortarego provizora iom post iom elkreskos la estonta vortarego oficiale fiksita. – Mia ideo estas kompreneble nur teoria; ĉu ĝi estas efektiviginda kaj efektivegebla, – pri tio povas juĝi nur la estraro de la Lingva Komitato, kiu sola havas aŭtoritaton kaj sperton pri tiu demando; tamen mian respondon pri la vortarego mi donas publike pro tio, ke niaj samideanoj havu okazon pripensi la aferon kaj eble esprimi ian utilan opinion, aŭ proponi sian helpon al la Komitato, se tiu lasta ĝin bezonus.

(Respondo publikigita en *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p.233)

KONVERSACIOJ KUN KLAŬDO

Partopreno en la reviziado de PIV

[Partoj de la sekva materialo jam aperis en aliaj E-periodaĵoj; la ĉi-suba versio estas profunde reviziita kaj de la aŭtoro kaj de la redaktoro. – red.]

Antaŭ ol mi respondis al reklamo en *Eventoj* en la aŭtuno de 1995, mi ne multe pensis pri la laboro krei kaj ĝisdatigi la efektive normigan vortaron de Esperantujo, la *Plena Ilustrita Vortaro*. Laŭ la reklamo, oni bezonis multajn homojn, kiuj povas uzi komputilon kaj teksto-prilaborilon por kontroli la enhavon de dosieroj kreitaj per skanilo kaj komputilo. Mi supozis, ke pro divido de la taskoj, la laboro por unuopa individuo ne estus sizifa. Post preskaŭ tri jaroj mi konstatas, ke miaj supozoj nur duonveris.

Mi skribis leteron kaj Claude [Klaŭdo] Roux de Marsejlo tuj respondis. Mi eksciis, ke la nova Ĉef-Redaktoro estas Profesoro Michel Duc Goninaz, la sama afabla homo kiu instruis ĉe la E-kursaro en San-Francisko antaŭ kelkaj jaroj. Klaŭdo estas biologo ĉe la tiea universitato kaj servas kiel kunordiganto pri diversaj sciencaj fakoj. Ŝajnas, ke Klaŭdo estas ankaŭ spertulo pri komputiloj kaj tre bone regas la modernan teknologion.

Klaŭdo sendis al mi disketon sur kiu troviĝis dosiero adaptita al mia komputilo, al mia regprogramaro kaj al mia teksto-prilaborilo. Nur tia atingo, miaopinie, estas pruvo de komputila kompetenteco. En la dosiero, kiun mi devis korekti, estis nur duono el la materialo sub la litero »O« en la nuna PIV.

Estis mia tasko kontroli kaj korekti la tekston, por ke ĝi estu precize tia, kia ĝi troviĝas en la presita PIV. La teknologio pri tekst-skanado kaj la programoj por ĝuste interpreti la literojn ne estas perfektaj. La tasko estis tre postula eĉ por modernaj maŝino kaj programaro. Necessis ĝuste legi la ĉapelitajn literojn, grasajn kaj kursivajn literojn, superskribojn kaj indicojn, kaj diversajn vinjetojn kaj simbolojn. Pro mankoj en la kapablo de eĉ la nuntempa teknologio, estis multe da eraroj por korekti. Mi bezonis tagojn

sen interrompoj nur por fari onon de la laboro transdonita al mi. Kaj multaj homoj ĉirkaŭ la mondo same laboris.

Eble vi miras, ke oni tiom multe laboris nur por rekrei en komputilaj dosieroj la malnovan kaj korektendan enhavon de la aktuala PIV. Tamen, tio estis nur la unua paŝo en longa vojaĝo. Ĝis nun, laŭ mia kompreno, la tuto el la enhava materialo, la korektendaĵoj, la proponitaj aldonoj ktp. troviĝis en granda sliparo. La laboro, por entajpi ĉiun, dissendi kaj diskuti perletere, revizii, retajpi, kaj plue helikpoŝte distribui kaj diskuti, postulus jarojn kaj laboron tute preter la kapablo de malgranda organizo kiel SAT (Senacieca Asocio Tutmonda, la eldonanto de PIV). Do, estis absolute necese, ke la enkomputiligado estu la unua paŝo al reviziado.

Mi kaj multaj ĝisostuloj skanis la vortaron nur per la okuloj kaj cerboj por trovi mankojn kaj erarojn. Mi eĉ trovis kelkajn korektendaĵojn pri mia lando kaj pri mia fako.

Mi estis kontenta, ke mi iom kontribuis al la projekto, kaj mi turnis mian atenton al aliaj farendaj aferoj. Baldaŭ mi ricevis mesaĝon de Klaŭdo per elektronika poŝto (ekde tiam la e-poŝto estas la precipa metodo por interkomuniki): ĉu mi povus revizii la terminojn pri ĥirurgio? – ne estas multaj. Mi protestis, ke mi ankoraŭ estas studanto de Esperanto, devas partopreni en someraj kursoj kaj estas neniel kvalifikita por prilabori vortaron. Klaŭdo klarigis, ke oni bezonas nur mian ĥirurgian scion; Michel Duc Goninaz mem responsos pri la preciza elekto de la ĝustaj vortoj kaj gramatika formo por difini aferojn. Mi konsentis kaj ricevis alian dosieron por prilabori.

Kvankam la dosiero estis relative malgranda, mi bezonis plurajn tagojn por ekzameni kaj pripensi ĉiun terminon kaj fari notojn pri mia taksado kaj sugestoj. Efektive, la nombro de la eraroj iom surprizis min. Mi memoris ke PIV estas esence la rezulto de amlaboro fare de malgranda grupo de dediĉuloj, kiuj sur-

ŝultrigis enorman taskon. Fakte, en la PIVa antaŭparolo estas la vortoj de Lanti en 1927 al Grossjean-Maupin por konvinki tiun ĉi krei la antaŭanton de PIV, la *Plena Vortaro*: „Ne gravas ĉu tia gvidilo ne estos perfekta: la ĉefa afero estas ke ĝi ekzistu, ke oni vaste uzadu ĝin, kaj ke el tiu uzado rezultu la unuecigo de la komuna lingvo.”

Finfine la taskon kompletiginte, mi sendis la reviziitan dosieron al Klaŭdo. Nun mi povis ĝui la varman kontentecon de homo kiu bone laboris, eĉ faris la taskon preter la atendo de la laborestro. Mi eĉ ne imagis tion, kio sekvos.

Mi ricevis e-poŝtan dankmesaĝon de Klaŭdo. Tamen, Klaŭdo diris, ke urĝa kaj tute neatendita problemo aperis: la samideano kiu promesis gvidi la reviziadon de la medicinaj terminoj en la lasta momento ne povis. Ĉu mi povus tiun taskon akcepti? Tio tute ne eblas, mi pensis. Mi, kiu eĉ ne finis mian korespondan kurson, kaj kiu ĉiujare vojaĝas al San-Francisko por ion lerni, nepre ne kapablas fari tiun grandan taskon, akcepti responson ktp. Cetere, mi ankoraŭ ne tute emeritiĝis kaj mi havas multe da laboro por fari en la medicina lernejo. Mi pledis al Klaŭdo ke tia tasko devas esti teama entrepreno, laboro de tuta komitato de medicinistoj. Mi proponis ke mi prezentu la problemon al la jarkunveno de la Universala Medicina Esperantista Asocio (UMEA) ĉe la venonta Universala Kongreso. Klaŭdo, senfine pacienca, petis min prezenti la problemon, peti helpon kaj establi taŭgan komitaton.

Mi planis ke ĉe la jarkunveno de UMEA mi forŝovos la tutan aferon al alia kuracisto, al iu kiu multe pli kapablas ol mi. La Prezidanto de UMEA donis al mi tempon por paroli. Mi detale klarigis la problemon al la ĉeestantoj. Mi supozis ke ĉiu en la kunveno tuj komprenos la gravecon de la situacio kaj vidos ke li devas agi. Eble iu volontulus kiel Prezidanto de PIVa Komitato, alia proponus sin kiel responsa por iu aŭ alia fako ktp. Tute ne. Kiam mi finis paroli,

estis nur silento. Neniu diris ion ajn, neniu volontulis. Finfine la Prezidanto de UMEA demandis: „Ĉu estas alia afero por prezenti al la jarkunveno?” Venkite, mi sidiĝis. Malrapide, kiel la enfluo de miasmo, la malagraba fakto penetris mian cerbon, ke mi mem devos revizii la medicinajn terminojn en *PIV*. La tasko estas tiom grava ke iu devas ĝin fari, kaj ŝajnis ke tiu »iu« estas mi.

Kvankam la tasko estis tre temporaba, ĝi ne estis tiom malfacila kiom mi unue anticipis. Mi havas centojn da medicinaj libroj en mia privata libraro, kaj mi aĉetis novan anglan medicinan vortaron. Malgraŭ ĉio, *PIV* estas vortaro por la laikaro, kaj mi devis nur sufiĉe bone difini la terminojn por kontentigi la nefakulojn, kvankam mi plejparte sukcesis evoluigi difinojn, kiuj povus ankaŭ kontentigi la plimulton eĉ de la fakuloj. Vorton post vorto mi luktis kun la materialo, dum la tuto de tri tagoj en unu semajno, dum la tuto de kvar tagoj en alia, ĝis monatoj pasis kaj la tasko de »abazio« ĝis »zostero« finiĝis.

Kiel mi antaŭe rimarkis pri la ĥirurgia parto, simile inter la medicinaj terminoj mi trovis multajn fakajn erarojn, tamen la tuto ĉiam bele verkita en senriproĉa Zamenhofa Esperanto. Estas malfacile por mi vere kompreni kial tiom da eraroj troviĝis en vortaro aŭtoritata inter la esperantistoj. Tamen, mi ne diskutos plue pri tio, ĉar eble iam en la venontaj jardekoj alia revizianto simile rimarkos pri la eraroj, kiujn mi ne trovis kaj ne korektis, aŭ eĉ kreis per mia kontribuo.

Tamen, la reviziado de la medicina parto ne estis nur afero pri eraroj. Temas ankaŭ pri forigo de arkaikaj terminoj kaj aldono de terminoj por ĝisdatigi kaj modernigi la vortaron. Tiuj du taskoj estas efektive multe pli malfacilaj ol nur trovi kaj korekti erarojn, kaj mi ne havas iluzion ke mi ĉiam faris kontentige. Pri arkaikaj terminoj, mi ofte nur klarigis al Klaŭdo, kaj pere de li al Michel Duc Gonnaz, ke termino estas ne plu uzata kaj devas resti nur se ĝi estas grava por kompreni la malnovan literaturon. Mi opinias ke ili ofte solvis tiun problemon per tre mallonga difino kaj indiko pri la eksmodeco.

Decidoj pri novaj vortoj estas eĉ pli

malfacilaj. Mi aldonis kelkajn, sed la plejparton de tiu laboro mi lasis al estontaj reviziantoj. Laŭ mi, devas esti konstanta komitato el kaj medicinistoj kaj vortaristoj por pripensi eblajn aldonojn. Medicinistoj povas nur rimarki vortojn, kiuj ofte aperas en la literaturo kaj mankas en *PIV* kaj laŭe rekomendi. Tamen *PIV* ne estas medicina vortaro, kaj nur la vortaristoj povas decidi pri tio, kio taŭgas por laika gvidilo.

Kiam mi finfine forsendis mian tute reviziitan dosieron al Klaŭdo, mi imagis ke la granda laboro estas nun ĉe la fino aŭ almenaŭ preskaŭ tie. Tamen, mi refoje konstatis ke mia imagpovo povas esti ege trompema. Post la formalaj dankmesaĝoj de Klaŭdo kaj Michel Duc Gonnaz, mi komencis ricevi pluajn mesaĝojn per elektronika poŝto: jen proponita aldono, jen demando, jen peto por klarigo. Ĉar ĉiu artikolo post kapvorto povas tuŝi multajn fakojn, aliaj spertuloj ofte prilaboris la saman materialon. Do, ekzistis jen kaj jen konfliktoj kaj malsamaj opinioj, kiujn Klaŭdo rimarkis, kaj li disendis la diversajn opiniojn al ĉiuj koncernatoj por findecido. Klaŭdo mem estas sciencisto kaj havas firmajn (ofte bonajn) ideojn, ekzemple pri la neceso inkluzivi la precizan sciencan nomon de la mikroorganismo kiu responsas pri infekta malsano.

Dum multaj monatoj Klaŭdo kaj mi konversaciis per elektronika poŝto pri tiu aŭ tiu ĉi punkto. Ofte mi sendis mian respondon al li en la vespero, kaj kiam mi ellitiĝis je la kvina aŭ sesa horo matene, lia plua respondo jam atendis min, pro la kvinhora plifrueco de lia labortago. Eble mi eĉ iĝis masohisto, ĉar finfine mi ne nur ĝuis la preskaŭ ĉiutagajn mesaĝojn sed mi komencis antaŭĝui la mesaĝojn kaj la laboron por solvi la tiu-tagajn problemojn.

Antaŭ jaro mi supozis ke la afero estas nun preskaŭ finita. Ni finis la interŝanĝon de mesaĝoj pri la vorto »zostero«, jen la fino de la alfabeto. Tamen, mi ricevis de Klaŭdo novan e-poŝtan mesaĝon: li baldaŭ finpretigos la laboron pri fiziologiaj terminoj; ĉu mi dezirus tralegi kaj kritiki tiun terminaron? Kompreneble, mi deziris partopreni en tiu parto de la projekto, ĉar fiziologiaj vortoj kaj

nocioj povas esti tre gravaj por medicinistoj. Kaj efektive, estis jen kaj jen malsamaj vidpunktoj, etaj nekonformecoj inter difinoj, problemoj, kiujn oni devis diskuti por atingi interkonsenton.

Tamen, ne nur fiziologoj reviziis: anatomicoj, biologoj, ĥemiistoj kaj aliaj sciencistoj ankaŭ submetis revizion de sia fako. La redaktoroj deziras, ke la nova *PIV* estu ne nur ĝusta sed ankaŭ kongrua inter la fakoj. Pro tio la elektronikaj mesaĝoj ankoraŭ alvenas de tempo al tempo kun problemoj por elnodi. La konversacioj daŭras. Sed pri tio aliffoje.

Stevens T. NORVELL, Jr. (Halifax NS)

The Other Ellen Eddy

Do you ever think that something out in the great internet space eats your messages? Have you sent an important message and never received an answer? Could be you sent it to someone else. Recently, I was asked about two messages that I had not received from my daughter Chris. She was sure she had sent them until she got a message from Ellen Anne Eddy stating that she had no children so therefore could not be my daughter's mom. Chris discovered that she had typed in `elleneddy@aol.com` instead of the correct address `eddyellen@aol.com`. I too sent a message to Ellen A. Eddy and asked her whether she had received any messages about Esperanto or in Esperanto. She responded yes and was glad to have those strange messages cleared up. She promised to forward to me any messages about or in Esperanto if I would reciprocate by sending to her any strange messages about quilting. Thus one more person learns about Esperanto.

P.S. If you have ever sent me a message and did not receive a response, would you please try again. I'm wondering what those important messages might have contained.

Ellen M. EDDY
`eddyellen@aol.com`

Pliaj spertoj ĉe NAKE

Dum la frua tempo de mia Esperanta vivo – efektive dum la unuaj du kaj duona jaroj – mi estis tute izolita. Mi lernis tre entuziasme kaj progresis sufiĉe rapide ĝis mi atingis sufiĉan fluecon. Mi multe legis, aŭskultis sonbendojn kaj skribis leterojn – do vere mi uzis la lingvon. Sed io mankis. Por mi Esperanto estis surpapera, sursonbenda lingvo. Por mi Esperanto ne havis vivan homan vizaĝon, t.e. ĝi ne estis por mi enkarna realaĵo.

Finfine mia izoliteco finiĝis kiam nia loka societo fondiĝis en Atlanto. Do, danke al Dio Esperanto ĉesis esti por mi nura surpapera afero. Mi finfine povis senpere paroli kun aliaj esperantistoj. Sed ankoraŭ ŝajnis al mi kvazaŭ mi estus misiisto en iu fora lando aŭ soldato en iu izolita dezerta fortikaĵo. Por mi “Esperantio”, tiu bela, verda lando de paco kaj amikeco ankoraŭ ne estis plene viva, nekontestebla realaĵo.

Tamen la montreala kongreso, la unua por mi, ŝanĝis ĉion. Dum NAKE mi unuafoje spertis Esperantion kiel plene vivantan realaĵon. Mi vidis la zamenhofan revon efektiviĝi antaŭ miaj okuloj. Ĉeestis homoj el ĉiuj partoj de Usono kaj Kanado, el aliaj mondopartoj, de diversaj religiaj, politikaj kaj filozofiaj tendencoj, de diversaj klasoj, rasoj, aĝoj, profesioj ktp; sed ĉi tiuj diferencoj ne dividis nin. Dum la kongreso mi vidis ne tiom da apartaj grupoj nenature kunmetitaj sub unu komuna tegmento, sed tute male, mi vidis **unu familion**. La membroj de familioj ja ofte diferencas unu de la alia, sed ili tamen ne povas nei la fakton, ke ili apartenas al la sama familio malgraŭ la diferencoj. Kaj ĝuste kiel en familio, dum NAKE mi neniam renkontis fremdulon, nur antaŭe ne renkontitajn familianojn. Dum la tuta kongreso mi neniam sentis min eksterulo. Vere, mi sentis min kvazaŭ longe forestinta familiano reveninta hejmen.

Por mi ĉio ĉi estas pruvo, ke la Interna Ideo ne estas nur ia naiva revo, kiu ne plu validas. Ĉio ĉi pravas, ke la Interna Ideo ja estas vivanta realaĵo. Dum niaj Esperantaj kongresoj realiĝis tiu paca,

amikeca mondo pri kiu Zamenhof revis. Tio estas la mistiko de Esperanto. Kiel “nura lingvo” povas tion fari mi ne scias. Sed mi vidis, mi spertis kaj mi miris. Tiom mirinda kaj kvazaŭ nekredebla estas tiu fenomeno, ke foje dum la kongreso mi devis min demandi “Ĉu ĉi tio vere okazas?”. Kaj poste, jam reveninte al la “reala mondo”, mi ankoraŭ demandis min “Ĉu mi vere travivis tion? Aŭ ĉu eble ĝi estis nur longa, bela sonĝo?” Eĉ nun mia intelekto foje iom dubas, kvankam mia koro ja kredas.

Nun, tri monatojn poste, mi sopire memoras tiun belan kongresan sperton. Mi memoras tiun amikecan spiriton, kiu ĉie sentebliis. Mi memoras la amuzon de la bankeda vespero, de la Kajto-koncerto, de la interkona vespero kaj de la kongreso ĝenerale – kaj, verdire, mi ne povas memori kiam mi tiom amuziĝis dum nur kvar tagoj. Mi memoras kaj fieron kaj emocijon, kiuj plenigis min kiam ni kune kantis *La Esperon*, kies spirita vereco tiom forte min trafis. Kaj mi memoras ankaŭ mian malĝojon post la fino de la kongreso kaj denove kiam mi forlasis Montrealon. Do vere, la Interna Ideo ne estas fantazia revo pri iu paradiza estonta monto, sed ĝi estas vivanta nuna realaĵo, kiu vivas en ĉiu vera esperantisto, kaj kiu konkrete kaj konstateble efektiviĝas en niaj Esperantaj kongresoj. La esperantistaro unue spertis tion en 1905 en Bulonjo-ĉe-Mar, kaj en 1998 en Montrealo mi spertis la samon.

Do, se vi neniam partoprenis Universalan Kongreson, la landan kongreson, la Esperanto-kursaron ĉe SFSŬ aŭ iun alian grandan Esperanto-aranĝon, mi ja kompatas vin. Mi bone scias ke ofte mono kaj tempo mankas, sed mi kuraĝigas kaj instigas vin partopreni Esperanto-aranĝon se vi iel povas. Konsideru la eventualan eblecon partopreni ĉi-jare la Universalan Kongreson en Berlino, la Internacian Junularan Kongreson en Zánka, la ELNA-kongreson en Sankta-Luizo, la Esperanto-kursaron ĉe SFSŬ. Mi certigas, ke vi neniel bedaŭros tion.

Joel AMIS (Alpharetta GA)

Bonvenon al...

SANKTA-LUIISO, MISURIO PORDEGO AL LA OKCIDENTO

Sankta-Luiso estis fondita en 1763 de Pierre Laclède, franca felkomercisto al kiu transdonis la terenon la reĝo de Francio. Ekprosperis la kolonio pro sia bonega situo ĉe la kunfluo de du gravaj riveroj: la Misuria kaj la Misisipia. Alvenis indianaj kaj franc-kanadaj bestkaptistoj, kiuj komercis per luksaj peltoj. En 1803 sekvis ilin la fame konataj esploristoj Lewis kaj Clark, kiuj de ĉi tiu regiono komencis esplorojn kaj poste atingis la plej nordokcidentan parton de la lando, apud la Pacifika Oceano.

La urbo leĝe registriĝis kiel jura persono en la jaro 1823, kaj oni starigis la urblimojn (kiuj estas la samaj hodiaŭ) en 1876. Jam en la jardeko post 1870 la loĝantaro kreskis ĝis 300 000, kaj dum la 1890-aj jaroj Sankta-Luiso estis la kvara inter la plej grandaj urboj de Usono.

En 1857 finkonstruiĝis fervojo liganta Sankta-Luison kun la orienta marbordo. Tuj komenciĝis enfluo de amaso da emigrantoj ĉefe el Eŭropo, inkluzive de irlandanoj, germanoj, poloj kaj italoj.

La jaro 1904 famigis la urbon internacie pro la grandega ekspozicio sesmonata – la “Ekspozicio de la Luiziana Terenaceto” – kiu oni ofte familiare nomas la “Monda Foiro”. Ĝi enkondukis al la mondo la unuajn glaciaĵojn tute manĝeblajn en konusformaj ŝeloj, la unuajn kolbas-sandviĉojn kaj teon kun glacio. Cetere, ĉe la Foiro oni unue en Usono varbis por Esperanto. Iu S-ro John F. Twombly venis de Bostono kun grupo de eŭropaj esperantistoj kaj aranĝis Esperanto-standon. De tiu tempo estiĝis Esperanto-movado en Usono. Bedaŭrinde, la spuroj de tiu ĉi frua Esperanto-agado en la urbo ŝajne malaperis.

La urbo finance apogis aviadiston Charles A. Lindbergh, kiu revis pri la eblo transiri la Atlantikan Oceanon de Novjorko al Parizo. Li fariĝis loka heroo, kies aviadilo “La Spirito de Sankta-Luiso” memorigas la mondon pri la ori-

